

UNU MONDO

Esperantista partio por justa tutmondiĝo

La esperantista partio UNU MONDO rigardas la tutmondiĝon kiel ŝancon por realigi homajn rajtojn kaj forigi malriĉecon ĉie en la mondo. Por eluzi tiun ĉi ŝancon, ĝi engaĝiĝas por tutmonda pensado kaj ideoj el la konceptoj de solidara ekonomio kaj ekologi-sociala merkata ekonomio.

La etika bazo de UNU MONDO

UNU MONDO komprenas sin kiel politikan branĉon de la movadoj por monda etiko kaj interkultura humanismo – t.e. de strebadoj akiri el la diversaj kulturoj minimuman konsenton pri bazaj principoj, kiuj ebligas harmonian kunvivadon de la homaro. Al la bazaj principoj kaj celoj de UNU MONDO apartenas la respekto pri ĉia vivo, mediprotektado kaj daŭripova evoluo, homaj rajtoj, paca kunlaboro, tutmonda demokratio (i.a. per starigo de Parlamento ĉe UN) kaj dialogo inter la religioj kaj kulturoj anstataŭ militaj „solvoj“.

Esperanto

UNU MONDO rigardas Esperanton kiel lingvan ekvivalenton al monda etiko kaj interkultura humanismo. Kiel neŭtrala, facile lernebla dua lingvo Esperanto servas al internacia kompreniĝo kaj egalrajta kunlaboro. La ekzistantaj lingvoj (same kiel ekzistantaj religioj kaj mondkonceptoj) ne estu forigataj. Nuntempe pli kaj pli da problemoj solveblas nur per tutmonda kunlaboro; sekve gravas konstrui pontojn. Esperanto jam nun ebligas al homoj senti sin mondĉivitanoj. Ĝi estas parto de pli ol 120-jara humanisma kulturo, ĉar jam ĝia iniciatinto, Ludoviko Zamenhof, deziris malkonstrui lingvajn barojn favore al la celo, ke ĉiu „vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton“.

Ekonomia kaj eduka politiko

Tutmonda ekologi-sociala imposta sistemo certigu justan komercon, daŭripovan evoluon kaj la konservadon de la naturmedio. Projektoj por plibonigo de la vivkondiĉoj en la tuta mondo, kiuj havas ŝancon prosperi, estu subtenataj per sufiĉaj financaj rimedoj. Ekzemploj povus esti la starigo de mikrokreditaj sistemoj aŭ de kamparaj evolu-lernejoj por eduki enlandajn evolu-helpantojn. Nuntempe granda parto de la homaro ne havas ŝancon akiri bonan edukadon kaj kontribui sufiĉe al la ekonomia produktado. Per disvolvado de ĝis nun ne uzitaj homaj rimedoj, estigo de merkatoj en ĝis nun malavantaĝigitaj landoj, kaj malpliigo de etnaj konfliktoj kaj militoj la partio UNU MONDO volas ebligi tutmondan ekonomian prosperon, de kiu profitu – pere de justa disdivido – la tuta homaro.

Organizo

UNU MONDO fondiĝis la 1-an de novembro 2009 en Wiesbaden (Germanio) kiel politika asocio, kiu akceptas membrojn el la tuta mondo. Ĝi jam havas landajn reprezentantojn en 11 landoj de Angolo ĝis Ukrainio kaj deziras partopreni en balotoj ĉie en la mondo. En Germanio estas planite, ke UNU MONDO („Eine-Welt-Partei“, verŝajne kun nom-aldono „por justa tutmondiĝo“) partoprenos en la landa baloto en Hesio en aŭtuno 2013 kaj la eŭropa baloto en printempo 2014.

Adreso

UNU MONDO, c/o Ulrich Matthias, Rückertstr. 6, 65187 Wiesbaden, Germanio
retpoŝto um@unu-mondo.org, retejo www.unu-mondo.org

Mia lando estas la mondo kaj mia religio estas fari bonon. (Thomas Paine)